

ESPERANTO-MIDI-PYRENEES (FEDERACIO)

JARRAPORTO DE LA JARO 2017-2018

1. Regiona kunordigado

Membraro (kluboj, individuoj) kaj evoluo...

Federaciaj kunsidoj, kongresoj...

Rilato kun UFE, partopreno en landaj instancoj (ekz. interfederacia konferenco)...

La membraro kreskis de 86 ĝis 95 (15 el CEEA, 56 el EKC, 12 de Esperanto-Tarn, plus 6 individuaj membroj de UFE). Deko da membroj estas en pluraj listoj aŭ ne loĝantoj de la regiono.

La asocio ne estis reprezentata dum la **3 ufe-komitatkunvenoj** de 2017-2018.

Estis **3 kunsidoj en Arrout** antaŭ aŭ post la staĝoj por ĉefe interŝanĝi informojn.

Nia jarkunsido okazis la 17/12/2017 en Foix, okaze de la Esperanto-festo. Partoprenis 10 personoj, el 5 departementoj.

En la **komitato** membras Françoise Eriksen (31), Véronique Bichon (09), Alain Casiez (09), Jorgos Comte (09), Gilbert Darrieux (65), Marc Roger (31), Marion Quenut (31), Bernard Legeay (12), Michel Metzger (81), Christophe Chazarein (31) et Francis Bidault (81)

Marion sendis la konvokilojn kaj redaktis kaj kolektis la raportojn.

2. Informado kaj komunikado

Federacia gazeto, federacia retejo...

Informa materialo...

Informado en diversaj medioj (foiroj, lernejoj, ktp.)...

Partopreno en landskalaj kampanjoj...

Niaj retaj paĝoj kuŝas en la **portalo** <http://Esperanto-midipyrenees.org>. La unua fazo de la projekto pri nova portalo de la regiono Okcitanio PM okazis en Septembro 2018. Marion kaj Florian el Montpellier laboris kaj rete renkontiĝis 3-foje pri la projekto. La portalo ekde tiam gastigas ankaŭ paĝojn pri Langvedoko-Rusijono. Estas paĝo pri la federacio (ĝisdatigota), paĝoj laŭ asocio, kaj aparta retejo nun por Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo. Restas iom da laboro. La nomo de la retejo baldaŭ ŝanĝiĝos. Eblas krei kiel por Tuluzo apartajn retejon. En la blogo Cirkulero, publikiĝis 5 artikoloj en 2017-2018. La portalo kostas ĉirkaŭ 20€ jare por la federacio, 40€ entute (jam pagita ĝis 2020. La federacio Langvedoko-Rusijono repagos en 2019 kaj 2020, duonon de la jara kosto.

Nia asocio havas **informbultenon** kiu aperis nur unufoje (Januaro) : la « Cirkulero de Midi-Pyrénées », sendita papere al ĉiuj membroj, kune kun la Krokodil' de EKC ; pasintjare, nia asocio pagis por la sendado kaj la printado. EKC zorgis pri la sendado. En ĝi ankaŭ kuŝis diversaj aliĝiloj.

La asocio Espéranto Tarn partoprenis kiel kutime la organikan foiron Biocybèle. Pri EKC, legu la apartan raporton.

Ne estis aparta ago de nia federacio por **konigi Esperanton en la regiono** (en la departementoj sen asocioj, kiel antaŭ pluraj jaroj en Montalbano kaj Kadurko). Ĉi-jare, denove ne estis stando en Bio Synérgie, en Montalbano, pro manko da homfortoj kvankam estas esperantistoj surloke.

3. Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj, staĝoj, nombroj da lernintoj...

Ekzamensesioj federaciaj aŭ klubaj, nombro da ekzamenitoj...

Kursoj pli malpli regule okazas iniciate de lokaj asocioj. Tri **semajnfinaĵoj** okazis en Arrout (Arieĝo), organizitaj de EKC (inter 15 kaj 23 partoprenintoj).

En Tarno, estas kurso kun 8 personoj en Graulhet. En Tuluzo, vidu la apartajn raportojn de EKC pri kursoj kaj Ekzameno.

En Tarn et Garonne, esperantisto kadre de « Les Francas » gvidas plurajn atelierojn por infanoj kaj plenkreskuloj (sed ni ne ricevas informojn).

4. Kulturo kaj aranĝoj

Prelegoj, prelegturneoj, renkontiĝoj, festoj, ĝemelklubaj aranĝoj...

Partopreno en kongresoj aŭ aranĝoj landaj, eŭropaj aŭ mondaj...

La **tradicia Esperanto-Festo** kunvenigis en Foix, la 17an de decembro 2017, kvindekon da esperantistoj el la regiono, por atelieroj, vizito, koncerto, spektado de filmoj, debato, foiro de asocioj, libroservo.

Pri aliaj aranĝoj kaj agadoj en Tuluzo, vidu la raportojn de EKC. Eurokka estis partnero de la « Tago pri Ekzilo » kadre de SEMEO en Marto.

En Arieĝo, okazis la tradicia korusa staĝo.

Marion